

*The*  
NORTH AMERICAN  
ESPERANTO REVIEW



Dr. L. L. Zamenhof - - - Creator of Esperanto

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Novembro - Decembro • 1957

# NI PETAS

KE ONI ATENTU LA ADRESON  
DE LA REVUO

La adreso citita en la Jarlibro de UEA,  
1957, estas malnova adreso.

La nuna adreso de la *Revuo* estas:

North American Esperanto Review  
2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,  
Usono.

La redaktoro estas:

F. R. Carlson, sama adreso.

## *The North American Esperanto Review*

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *Secretary*: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer*: Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

*Membership Dues*: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

*Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."*

NOTO: Korespondpetoj, kiuj aperas sub "Bonvolu Skribi", estas senpagaj. Por aliaj anoncoj aŭ reklamoj: ĝis sep linioj de unu kolono, \$1; pli ol sep linioj ĝis 1/4-paĝo, \$5; 1/2-paĝo, \$10; unu paĝo, \$20. El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon, oni sendu la valoron per neuzitaj poŝtmarkoj, aŭ similaj valorajoj, al: Conrad Fisher, Route 1, Meadville, Pennsylvania, Usono.

## The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 5, No. 6.

Nov.-Dec., 1957.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

*La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.*

## CONTENTS (English)

Dr. L. L. Zamenhof . . . . .	Page 1
Thus Spake Zamenhof . . . . .	2
How Did Our Language Get Its Name? . . . . .	3
Why Speak Esperanto? . . . . .	5
Local Addresses . . . . .	15
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto . . . . .	Inside Back Cover

## ENHAVO (Esperanta)

Estas Mi Esperantisto (Baghy) Paĝo . . . . .	4
Rememoroj pri Thomas A. Edison . . . . .	6
Esperanto en Norda Ameriko . . . . .	7
Historio . . . . .	8
Bonvolu Skribi . . . . .	10, 13
Trans la Lingvajn Barilojn . . . . .	11
Postenuloj de ELNA . . . . .	12
Nova Enigmo . . . . .	12
Lokaj Adresoj . . . . .	15
Por Rimistoj . . . . .	16

# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 5

Nov.-Dec., 1957

No. 6

Dr. L. L. Zamenhof, 1859-1917  
Creator of Esperanto  
Social Philosopher  
Linguist  
Artist  
Poet

**B**EFORE THE PRESENTATION OF ESPERANTO, many linguists and social philosophers had striven to solve the problem of language barriers dividing the peoples of the world. Success in these efforts, however, remained a will-o'-the-wisp until Dr. Zamenhof added to the knowledge of the linguist and the understanding of the social philosopher the sure touch of the artist and the vision of the poet.

For language must be a living thing, capable of growth and adaptation, closely linked to the lives of its users.

With the presentation of Esperanto, the international language was taken out of the cloisters of the learned and became an active instrument and living experience of millions of people. Simple, it is used for the simple correspondence of the unschooled; flexible, it is used for great works of literature, for expression of the most delicate nuances of thought.

Travelers use it to become acquainted with the people of the lands they visit; business firms use it to extend their markets abroad; propagandists use it to spread their ideas; technicians use it to exchange information in their fields; students of literature to present the best of their native literature to readers in other countries; people of all walks of life to establish understanding and friendship with Esperantists throughout the world.

Every issue of the *Review* is dedicated to Dr. Zamenhof's masterwork, Esperanto. This issue, to be published on the anniversary of his birth, December 15th, is dedicated to the Maestro himself.

# Thus Spake Zamenhof

“Antaŭ ĉio (kaj tio ĉi estas la plej grava) ni devas labori diligente kaj ne malvarmigi por la afero kaj tute ne zorgante tion, kion diras aŭ faras aliaj. Estas multaj, kiu, komprenante bone la utilecon de l' afero, alfalas al ĝi en la komenco tre varmege, certe kredante, ke post kelkaj monatoj la tuta mondo jam estos plena de la lingvo internacia; sed kiam, post kelka tempo ili vidis, ke la mondo estas ankoraŭ trankvila, ke la plej granda parto de l' mondo eĉ ankoraŭ ne scias pri la afero, ke la gazetoj ne alportas ĉiutage sensaciajn novaĵojn pri la irado de l' afero, — ili tute malvarmiĝis por la afero. De la efemera laboro de tiaj amikoj la afero ne sole nenion gajnas, sed kontraŭe, ĝi nur perdas. Sed efektivaj amikoj del' afero ne rigardas, ĉu la afero jam faris multon da bruoj kaj ĉu ĝi estas jam sufiĉe “en modo”; profunde kredante, ke la afero estas utila kaj havas estontecon, ili laboras senbrue, sed diligente kaj konstante, ĉiu en sia urbo, en sia lando kaj laŭ siaj fortoj, — kaj danke la laboron de tiuj ĉi amikoj mi esperas, ke la afero baldaŭ kaj sen bruoj vastiĝos en la tuta mondo.”

*El la Antaŭparolo al la Dua Libro, 1888.*

“Fari ion por nia afero povas ĉiu, se li eĉ loĝas en la plej dezerta vilaĝo. Se vi faros al vi regulon dissendadi ĉiumonate certan nombron da vortaretoj (kun antaŭparolo) al diversaj personoj, tiam vi alportos al nia afero multe pli grandan utilon ol multaj el niaj amikoj, kiu loĝas en grandaj urboj.” — *La Esperantisto, 1889.*

You, too, can follow Zamenhof's advice. Send leaflets to important people in *your* locality. Drop a leaflet (no writing) in an *unsealed* envelope. Use 2¢ stamp. 100 such envelopes per month will tell 1200 persons about Esperanto in a year. *Conrad Fisher*

“Above all (and this is the most important thing) we must work diligently and without losing enthusiasm for our cause and not caring at all what others say or do. There are many who, understanding well the usefulness of the cause, fell to it at first with ardor, believing for certain that in a few months the whole world would be filled with the international language, but when they had seen, after some time, that the world was still indifferent, that the greatest part of the world still did not even know about our cause, that the press was not carrying daily sensational news of the advance of our cause — they lost enthusiasm for the cause. Our cause not only gains nothing from such short-lived work of such friends, but on the contrary it only loses. But real friends of the cause do not look to see whether it has made a lot of noise and whether it is “in style”; deeply believing that the cause is a useful one and has a future, they work quietly but diligently and steadily, each in his own town, in his own country, and according to his own ability — and thanks to the work of these friends I hope that the cause will soon spread quietly throughout the world.” — *From the Introduction to the Second Book on Esperanto, in 1888.*

“Everyone can do something for our cause, even if he lives in the most isolated village. If you make yourself a rule to send out a certain number of vocabularies (with introduction) to various persons every month, then you will bring to our cause much more usefulness than many of our friends who live in great cities.”

## How Did Our Language Get Its Name?

The first textbook was published with this on its cover:

Dro ESPERANTO  
INTERNACIA  
LINGVO  
ANTAŬPAROLO  
kaj  
PLENA LERNOLIBRO  
por Rus,o,j  
etc.

So the new language was then called the international language of Dr. Esperanto, or Dr. Esperanto's international language, or simply Esperanto's language. Later it was called the Esperanto language, as you would say the Zamenhof language.

Dr. Zamenhof wrote this in his *La Esperantisto*, #33:

"Publishing the first textbook of our language, I took for me the pen name 'Esperanto'; the language itself had no name of its own and was called 'la lingvo internacia proponita de Esperanto'. For convenience, they began to use the expression 'Esperanto's language' (die Esperanto-Sprache); other expressions that some tried to use (for example: the international language, the international) were seen to be inconvenient and did not take root, because they were not easy to say, and not easily remembered by the public, and represented nothing definite (because 'international language' could equally well mean Volapük or other proposed projects).

"It was soon seen that only the word 'Esperanto' (alone or with other words) clearly differentiated our language from others, and many friends began to use in their letters or articles the single word 'Esperanto'; for example, 'la afero Esperanto', 'skribi en Esperanto', etc.

"Seeing that my original pen name had gone over to the cause itself, and that it was very handy, I soon stopped using my pen name and it remained merely as the name of the cause itself . . ."

---

Estas necese, ke ni ĉiam ripetadu *unu* nomon al la oreloj de la publiko, por ke ĝi kutimu al la nomo kaj respektu la konstantecon de la afero.

It is necessary that we always repeat *one* name to the ears of the public, so that it will be used to the name and respect the permanency of our cause. C. Fisher

### DO YOU KNOW — — —

61 children from seven countries came to the Fourth Children's Esperanto Congress as a part of the 30th SAT Congress in Rotterdam.

Dr. W. Drees, Netherland's prime minister, addressed the Congress in Esperanto.

The Esperanto book *Atakoj Kontraŭ Ĝardenplantoj* has had its fourth edition in the Danish translation in two years.

Representatives from 16 countries attended the 27th international congress of blind Esperantists at Lyons, France.

A five-page article on Esperanto has appeared in Volume VII of the Italian "Students' Encyclopedia".

Volume 11 of the Serbo-Croatian Encyclopedia contains several articles on Esperanto and prominent Esperantists.

# Estas Mi Esperantisto

de Julio Baghy

Verda stelo sur la brusto  
iom palas pro la rusto.

Mi ne estas purigisto:  
estas mi esperantisto.

Polkovrita sur bretaro  
putras mia SAT-vortaro.  
Tedas min la vorto-listo;  
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:  
"Bonan tagon! Ĝis revido!"  
Ĝi sufiĉas por ekzisto;  
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,  
sed nenion mi oferas.  
Mi ne estas ja bankisto;  
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento  
el la buŝo Nova Sento,  
ĝi sufiĉas por sofisto;  
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento  
"Netuŝebla Fundamento"

Tuŝu ĝin nur la Mefisto:  
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas  
kaj gazeton ne abonas . . .  
Librojn legu la verkisto;  
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikis,  
la gvidantojn dorne pikas  
kaj konspiras kun persisto;  
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo  
la movado, organizo,  
helpas mi nur per rezisto;  
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia  
staros "rondo familia",  
nekrologos ĵurnalististo:  
estis li esperantisto.

*el Argentina Esperantisto*

## NOVAJ INFORMFOLIOJ

ELNA eldonos (komence je 26 decembro) ses-paĝan informfolion pri Esperanto kaj la Ligo. Mendu ĉe: Adrian Hughes, 476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon. Prezo: \$10 por 500.

Mendu grandkvante. Dissendu al gvidpersonoj en via regiono: politikistoj, gvidantoj de kluboj, laborsindikatoj, religiaj grupoj, ktp.



### TUTKORAN DANKON!

Donacis por eldoni informfoliojn:

Familio Jungton	\$50
Anonimulo	\$40

## FILATELISTOJ, HELPU!


S-ano Donald Stephens, 2313 Woodland Lane, Arden, Delaware, entreprenas por ELNA provon pri registara eldono de jubilea Zamenhofa poŝtmarko en 1959 fare de la usona registaro.

Ni petas ke filatelistoj esperantistaj sendu al li prunte ĉiuspecajn poŝtmarkojn esperantajn (ne simplajn glumarkojn, sed verajn poŝtmarkojn) por ke li povu montri "Jen kion faras aliaj landoj!"

S-ano Stephens ankaŭ bonvenigos konsilojn kaj raportojn pri pli fruaj provoj en Usono, por ke li profitu el alies spertoj. Li bonvenigos ĉian spertan kunlaboron. Temas ĉifoje ĉefe pri Zamenhof-poŝtmarko, sed kredeble Esperanto-poŝtmarkoj ankaŭ imponos.

## Why Speak Esperanto and Not English At Our ELNA Congresses?

From Dr. Zamenhof's speech to the Preparatory Conference of the Esperantists of Russia at St. Petersburg, 1910. Translation by Conrad Fisher.

 STEEMED LADIES AND GENTLEMEN! Perhaps you will wonder why I am speaking to you not in Russian, but in Esperanto; perhaps you will say that, since we are now holding a congress of citizens of the same realm and all, or at least nearly all, its participants understand very well the same language, it is much more natural to speak to you in that language. However, there are important reasons why I chose for my talk that language for which we are fighting and for which we are meeting.

Our congresses, not only the universal ones, but the national ones, have above all an instructive and educational significance. Esperantists, scattered in different cities and towns, meet in a more or less large mass to hear our language, to check on whether they have correctly mastered the language, whether they understand it well, to compare their own manner of speech with the accent of more experienced esperantists. When they later return home, they not only speak more purely themselves, but they bring back a model of good speech to those who stayed home. Thus, the congresses regulate the usage of the language, and thanks to our congresses Esperanto is now spoken uniformly not only in the distant corners of every separate country, but in the most diverse places of the globe. Already when we hear a good and experienced Esperanto orator, we can in no way guess the nation or country to which he belongs. The entire autonomous life of our language, with its own spirit, in no way borrowed or imitating any other, is ever more strengthened in that way, as if esperantists of the world lived together on one small piece of ground.

No less important is the educational significance of the Esperanto congresses. Isolated esperantists, who never had the possibility of applying in practice what

they've learned, often doubt if they could really become understood when they speak Esperanto. Even within the Esperanto clubs, they are often afraid to speak in Esperanto, they stammer, they prefer to speak in their own national language, and in proportion to the lack of courage in speaking Esperanto there also appears a lack of boldness in promoting it, because the esperantists who speak it haltingly in spite of themselves are not able to free themselves from the fear that perhaps Esperanto after all is only a more theoretical matter than a practical one. But when the stammerer comes to the congress, he has a chance to hear good and experienced Esperanto orators, when he becomes convinced with his own ears and eyes, how beautifully and fluently Esperanto can be spoken, he becomes enthusiastic, he sees that he is working for something living and full of life, he returns home with new courage and energy. Our congresses, not only the universal, but also the local ones, thus educate convinced consequently enthusiastic fighters for our cause.

That's why in all our congresses we must all speak not only about Esperanto, but in Esperanto, not only in the universal, but also in the national and regional ones.

*Originala Verkaro*

# Rememoroj pri Thomas A. Edison

Unu el la malnovuloj en la fabrikejo, kiun Edison fidis, estis Sam Moore. Sam estis sperta mekanikisto kiu lernis legi nur post sia 21a jaro. De Sam mi lernis multe pri la karaktero de Edison. Eble la eco, kiu super ĉiuj aliaj faris Edison sukceso estis la persistemo. Sam diris al mi pri mil eksperimentoj rilate la diafragmon de la fonografa reproduktilo. Sam ankoraŭ havis ĉirkaŭ kvindek diversajn diafragmojn. Unu, kiu funkciis bonege, fabrikiĝis el vizitkarto, kiun Edison kolektis el la pleto en la vestiblo. Li estis tre tentata telefoni la sinjorinon por trovi el kie ŝiaj kartoj elvenis.

Unu el la rakontoj de Meadowcroft estas pri la laboristo kiu plendis pri la tuta laboro malŝparita kiam ili provis mil diversajn filamentojn por la elektra lampo. La respondo de Edison estis, "Malŝparita? Ne! Ni scias mil metodojn per kiuj oni ne povas fari ĝin."

Alia rakonto de Sam estas, ke Edison kverelis kun la inventinto de "Bakelite", la plastika lako kiun li uzis sur la diskoj. La lako komencis reakcii malbone kaj ne malmoliĝi. Edison mendis iun el ĉiu en kemia katalogo kaj igis du virojn, neniu el kiuj estis kemiisto, miksi unu specimenon post alia en la lakon.

Sam diris jene pri si mem. Edison postenis lin en malgranda konstruaĵo kun kemia ekipaĵo. Ĉiumatene S-ro Edison donis al li skribitajn ordonojn kaj kolektis la raportojn de la antaŭtago. Sam nenion komprenis kion li faradis, kaj li iĝis kolera kaj eĉ freneza pro ĉi tia ŝajne neutila laboro. Fine Sam eksplodis kaj diris al S-ro Edison per tre klara kaj vulgara lingvo kion li povus fari per la ofico. Edison metis sian brakon sur la ŝultron de Sam kaj diris, "Nun, Sam. Ne koleriĝu. Estas ĝuste la kialo ke mi havas vin en tiu tasko. Se mi havas iun el tiuj inteligentaj kolegiaj

knaboj por fari ĝin, li nur tirus libron el sub la breto kaj dirus, "S-ro Edison, ne fareble!"

Mia propra sperto estis kiam mi trovis kaj provis procedon kiu malpliigus la tempon kaj la laboron por fabriki diskojn per 80%. Lia komento pri mia raporto estis, "Estas bonege, Borden. Nun trovu tri aliajn metodojn per kiuj oni povus fari ĝin."

Iun matenon, kiam mi envenis la oficejon por raporti, S-ro Meadowcroft piedpinte aliris min, kun fingro sur lipoj. Li flustris, ke Roald Amundsen, la arkta esploristo, parolas kun S-ro Edison kaj ke, se mi farus min ne rimarkebla, mi povus subaŭskulti. La diskuto estis pri vivo norde de la 85a paralelo. Amundsen argumentis, ke la glacio estas tiel dika ke nenij bestoj povus trairi ĝin kaj estas nenia nutraĵo por ursoj. Edison diris, ke la sola kialo ke esploristoj ne vidas vivantaĵon estas, ke ili ne atendas ĝin. Ŝajnis ridinde ke Edison argumentis kontraŭ ĉi tiu fama esploristo kaj ĉiuj aliaj, sed dum lia sekanta provo atingi la nordan poluson, la aeroplano de Amundsen falis norde de 86° kaj multaj specoj de vivantaĵoj vidiĝis inkluzive anseroj, foko, kaj ursoj.

Edison estis ordinara viro. Estis ĉiam makulo de tabaka suko ĉe la angulo de lia buŝo kaj li estis preciza pri sia celo al la kraĉujo. Ankaŭ li tre ŝatis fian anekdoton. Unu el miaj plej embarasaj okazoj estis kiam mi diris al li tian rakonton per laŭtega voĉo. Mi kredis ke li havos apopleksion, li ridis tiel kore.

Kiuj estis la ecoj kiuj faris Edison granda? Mi opinias ke la plej grava eco estis la persistemo. Due mi taksas energion. Tria estas lia rimarkinda memorkapablo. Nur kvare mi taksas tiun tuŝon de genio, aktiva imagpovo. La genio de Edison estis absolute 90% ŝvito kaj 10% inspiro.

*Howard G. Borden*



# ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

NEW YORK, N. Y. — Je la 5a de oktobro, matene, S-ro Wolff aĉetis lernlibron por ekstudii Esperanton. Posttagmeze de la sama tago, li skribis kaj sendis leteron en Esperanto al S-ro Dormont. Li eĉ tradukis sian nomon, subskribis la leteron "Lupo".

LOS ANGELES, CAL. — Reelektiĝis: Prezidanto, Joseph R. Scherer; 1a Vicprezidanto, Edward Kalmar; 2a Vicprezidanto, D-ro Edmund A. Bartsch; 3a Vicprezidanto, Charles Chomette; Sekretariino, F-ino Celia Winnick; Protokolisto, Elwyn Reed; Help-Protokolistino, S-ino Germaine Chomette; Kasistino, S-ino Blanche Parker.

S-ro Brink kaj Ges-roj Helmuth, el San Diego, raportis pri siaj eŭropaj vojaĝoj kaj pri la Universala Kongreso, kiun ili ĉeestis. S-ro Holenstein prezentis sian novelon, kiun li alportis el Svislando.

PASADENA, CAL. — S-ino Van Haden instruas entuziasman grupon ĉe la YWCA.

SAN DIEGO, CAL. — La membraro decidis aranĝi "kromkunvenon" proksimume du semajnojn post la oficiala monata kunveno. Ges-roj Helmuth kaj S-ro Brink raportis pri siaj vojaĝspertoj. S-ro Enrique Balech, Prezidanto de la Argentina Esperanto-Ligo, parolis al la klubo pri siaj spertoj. Li restos en San Diego, studante ĉe Instituto Scripp's. S-ro Kiyoshi Ikegawa, Vicdirektoro de Publika Bonstato en Osaka, Japanujo, ĉeestis klubkunvenon kaj ankaŭ vizitis Esperanto-klason en la gimnazio kaj prelegis en Esperanto al la gekursanoj.

JOHNSON CITY, N. Y. — Kiel parto de la Eduka Programo por Plenaĝuloj ĉe Johnson City Gimnazio, S-ino Gerald Sherman nun instruas Esperanto-klason vespere en tiu gimnazio.

ST. LOUIS, MO. — Ĉe oktobra kunsido de *Humanist Student Center* oni aŭskultis tri prelegantojn pri "Internacia Lingvo". Rezultiĝis nova Esperanto-kurso por komencantoj.

## NOVA ESPERANTO-DOMO

Petu informon pri la nova Esperanto-Domo, kie vizitantoj esperantistoj povas pasigi nokton aŭ kelkajn tagojn senpage. Skribu al: Dr. Stephan Chobanof, 1709 Lanier Place, N. W., Washington 9, D.C.

Ni petas, ke oni *ne* venu sen skribi antaŭe por informiĝi pri datoj kiam ĉambroj estos haveblaj.

## PUBLIKA INFORMADO

Adrian Hughes, komitatestro pri informado, anoncas ke S-ino Lee W. Gibson, P. O. Box 117, Riverdale, Cal., estas nova membro de la informkomitato.

Leteroj al redaktoroj pri Esperanto lastatempe aperis en: *Evening Gazette*, Worcester, Mass.; *Portland Oregonian*, (Ore.); *Fresno Bee* (Cal.); *Oakland Tribune* (Cal.); *Seattle Post-Intelligencer* (Wash.); kaj la gazeto *Future* (Hillsboro, Ore.). En la *Seattle Times* aperis artikoleto pri la novaj hungaraj Esperanto-poŝtmarkoj, kaj *Johnson City Journal* prezentis artikolon pri Esperanto kaj la nova Esperanto-klaso de S-ino Sherman.

Ok informpetoj venis al Adrian Hughes rezulte de supre menciita letero en *Future*. 47 venis pro letero aperinta en *Americas* (en la angla- kaj hispanlingva eldonoj).

Dum proksimume unu monato, S-ano Carlson disdonis 3000 da siaj anglalingvaj "vizitkartoj" (vidu p. 16).

*Raportu la progreson en VIA urbo!*



**KELĤAJ DATOJ EL LA VIVO  
KAJ VERKADO DE ZAMENHOF**  
(*Mallongigoj: Z, Zamenhof; E, Esperanto;  
UK, Universala Kongreso de Esperanto.*)

1. 15 dec. 1859 en Bialystok, Rusujo, naskiĝis Lazaro Ludoviko Zamenhof.
2. 1869, Z fariĝis lernanto en reallernejo en Bialystok.
3. 1873, Z transloĝiĝis Varsovion, Rusujo.
4. 1874, Z fariĝis lernanto de la kvara klaso en la dua gimnazio en Varsovio.
5. 5 dec. 1878, Z festis la ekvivigon de sia lingvo.
6. Junio 1879, Z finis gimnazion.
7. 1879, Z forveturis Moskvon.
8. Somero 1881, Z revenis Varsovion.
9. Januaro 1885, Z ricevis diplomon de kuracisto.
10. 1885, Z laboris en Ploek, Vejseje.
11. 1886, Z veturis Vienon.
12. Aŭtuno 1886, Z revenis Varsovion.
13. 30 marto 1887, Z fianĉiĝis kun Klara Silbernik.
14. 2 junio 1887, rusa cenzuro permesis eldonon de la unua E-lernolibro.
15. 26 julio 1887, aperis unua lernolibro, kun 917 vortoj (904 vortradikoj).
16. 9 aŭg. 1887, Z edziĝis kun Klara Silbernik.
17. En komenco de 1888, Z eldonis duan lernolibron.
18. Junio 1888, Z publikigis aldonon al la dua lernolibro.
19. 1 sept. 1889, aperis en Nurnberg, Germanujo, la unua numero de "La Esperantisto", de Chr. Schmidt.
20. Nov. 1889, Z vojaĝis al Brest-Litovsk, Bialystok, Ĥerson.
21. Okt. 1889, Z aperigis unuan adresaron de esperantistoj kun mil nomoj: 29 germanoj, 20 aŭstro-hungaroj, 10 angloj, 6 francoj, 4 usonanoj, 4 svedoj, 2 turkoj, 1 italo, 1 hispano, 1 rumano, 1 nedirita kaj 921 rusujanoj.
22. Majo 1890, Z revenis Varsovion.
23. Okt. 1890, Z estis eldonisto kaj redaktoro de "La Esperantisto".
24. Aŭg. 1891, Z proponis organizon de "akcia societo esperantista".
25. Numeroj 11-12 (nov.-dec.) 1891 estis la lasta eldono de "La Esperantisto".
26. Marto 1892, denove aperis "La Esperantisto".
27. Aŭg. 1892, mortis Rozalio Z, patrino de Z.
28. Aŭg. 1893, aperis universala vortaro, kun 2635 vortoj (2599 radikoj)
29. Okt. 1893, Z vojaĝis kun sia familio Grodnon.
30. Post dec. 1894 "La Esperantisto" tute transiris al Z.
31. En # 2, 1895 de "La Esperantisto" aperis traduko de verketo de Tolstoj, "Prudento kaj Kredo", kaj la gazeto estis de la rusa cenzuro por ĉiam malpermesata en Rusujo.
32. # 5-6 (majo-junio) 1895 estis la lasta numero de "La Esperantisto"
33. Dec. 1895, en Upsala, Svedujo, aperis la unua numero de "Lingvo Internacia" de P. Nylen, Langlet, Krikortz, Ahlberg, V. Gernet.
34. # 6-7, 1896, de "Lingvo Internacia" prezentis la leteron de Z al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko en Odesso, 1895, pri la deveno de E.
35. Jan. 1898, Z revenis Varsovion.
36. 1899, publikigis "Esenco kaj estonteco de l' ideo de internacia lingvo", de Z.
37. 1901, Z subskribis kontrakton kun firmo Hachette et Cie. en Parizo.

38. 7 nov. 1901, en Essen, Germanujo, mortis W. H. Trompeter, kiu dum tri jaroj persone pagis la elspezojn de la unua E-gazeto, "La Esperantisto".
39. 1902, aperis traduko de "Hamlet" de Z.
40. 1903, aperis "Fundamenta Krestomatio", de Z.
41. 21 feb. 1905, Z sendis leteron (sian biografion) al A. Michaux,
42. Julio 1905, aperis Fundamento de E, kun 2772 vortoj (2666 radikoj).
43. 1905, franca ministro de publika instruado Bienvenu-Martin havigis al Z Ordenon de la Honora Legio.
44. 5-13 aŭg. 1905, 1a UK en Boulogne-sur-Mer, Francujo. 688 aliĝintoj el 20 landoj. Prezidanto Z; Viceprezidantoj E. Boirac, A. Michaux, Hippolite Sebert, Mybs, John Pollen.
45. 1905, UK akceptis laŭ propono de Z Deklaracion pri Esperantismo.
46. 27 aŭg.-5 sept. 1906, 2a UK en Genève, Svislando. 1200 aliĝintoj el 30 landoj. Prez. Fr. Schneeberger.
47. 1907, en Varsovio mortis Marko Z, patro de Z.
48. 12-17 aŭg. 1907, 3a UK en Cambridge, Anglujo. 1317 aliĝintoj el 35 landoj. Prez. John Pollen. Belgujo estis reprezentata.
49. 1907, Londona urbestro oficiale akceptis Z kaj la tutan kongreson en la fama urbodomo Guildhall.
50. 17-22 aŭg. 1908, 4a UK en Dresden, Germanujo. 1500 aliĝintoj el 40 landoj. Prez. Mybs. Usono, Japanujo kaj Filipinaj Insuloj reprezentitaj.
51. 5-11 sept. 1909, 5a UK en Barcelona, Hispanujo. 1300 aliĝintoj el 32 landoj. Prez. Puiulà y Valles. 4 ŝtatoj reprezentitaj.
52. 1910, aperis proverbaro esperanta de Zamenhof.
53. 14-20 aŭg. 1910, 6a UK en Washington, Usono. 357 aliĝintoj el 20 landoj. Prez. J. J. Barret. 16 ŝtatoj reprezentitaj.
54. 20-27 aŭg. 1911, 7a UK en Antwerpen, Belgujo. 1800 aliĝintoj el 42 landoj. Prez. Van der Biest. Belgujo, Brazilio, Ĉilio, Ĉinujo, Gvatemalo, Hispanujo, Hungarujo, Norvegujo, Rumanujo, Rusujo, Usono reprezentitaj.
55. 1911, en Antwerpen, Belgujo, Perogordo, delegito de la hispana registaro, havigis al Z ordenon de "Isabela la Katolika", la plej altan hispanan dekoracion.
56. 1911, la loka komitato de Antverpena kongreso dediĉis al Z belan pentraĵon pri la Antverpena haveno.
57. 30-12-1911, Z sendis al "The British Esperantist" leteron pri la deveno de la verda stelo.
58. 11-18 aŭg. 1912, 8a UK en Krakow, Aŭstrujo. 1000 aliĝintoj el 28 landoj. Prez. M. Mikolajski. 7 ŝtatoj reprezentitaj.
59. 11 aŭg. 1912, Z demetis sian rolon kiel gvidanto de la E-movado.
60. 1912, en Krakow, Aŭstrujo, Z ricevis de reĝino Elizabeth de Rumanujo ŝian portreton kun propra subskribo.
61. 1912, salutante Z, la salminejoj de Wieliczka, ensorbante pli ol mil esperantistajn gastojn, estis iluminataj same, kiel ili estis iluminataj por akcepti la aŭstro-hungaran imperiestron.
62. 24-31 aŭg. 1913, 9a UK en Bern, Svisujo. 1203 aliĝintoj el 30 landoj. Prez. J. Schmidt. 6 ŝtatoj reprezentitaj.
63. 2-10 aŭg. 1914, 10a UK en Paris, Francujo. Ne okazis pro la milito.
64. 22-29 aŭg. 1915, 11a UK en San Francisco, Usono. 163 partoprenantoj el 16 landoj. Prez. Robert Colquhoun.
65. 14 aprilo 1917, en Varsovio, Rusujo, mortis D-ro L. Zamenhof, kreinto de Esperanto.

*Kompilata de A. Holzhaus*

## Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado *en Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi.

Alois Lysy, Jihlava, Prazska 41, Ĉeĥoslovakio. Dez. interŝ. pm., pk. kaj alumet-etikedojn kun tutmondo.

Joel Tolentino, Av. Amaro Cavalcanti no. 2013 c-2 Eng. Dentro, Rio de Janeiro, Brazilo. 28-jara brazilano dez. kor. kun fraŭlino pri kutimoj kaj arto, interŝ. librojn, gaz. kaj bk.

Konrad Klocker, (14b) Zwiefalten, Germanio. 33-jara bankkontoristo. Ĉiuj temoj.

Fésüs Gábor, Vasvár, Szük u. 3, Hungario. 16-jaraĝa gimnaziano. Interesoj: ĵaz-notoj, muziko, sporto, pm., bk.

S-ro Yoshimi Koakutsu, 3830 Z-Chome, Minami-Machi, Nerima-Ku, Tokio, Japanujo. Ses japanoj dez. kor. kun amerikanoj.

Rafael Ayala, Av. Gmo. Franco, 243, Barcelona, Hispanio. 26-jara, dez. kor. kaj interŝ. bk. kun ĉiuj usonaj ŝtatoj.

Rob. Kreitzer, Brno 18, Štolcova 11, Ĉeĥoslovakio. Dez. kor. tutmonde, interŝ. alumetetikedojn kaj bk.

Prof. M. F. Walles, Al. Slowackiego 60/2, Krakow, Pollando. Dez. ricevi nord-amerikajn pm.

S-ro F. Mudra, Horazdovice, Ĉeĥoslovakio. 25-jara oficisto. Interŝ. pk., gaz. kaj filatele afrankitajn leterojn.

Takacs Lajos, Var-utca 2 szam III. emelet 3, Debrecen, Hungario. Interŝ. serion de hungaraj Esperanto-memorpoŝtmarkoj (2 pecoj) kontraŭ 2 respondkuponoj.

S-ino Poul Thorsen, Dyblandsvangen 7, Kjøbenhavn, BRM, Danlando. Dez. uzitajn pm. rilatajn al geografio por uzi en klasoj.

Osvetova beseda 3 – Esperanto, Pardubice, Ĉeĥoslovakio. Granda letervespero okaze de kursfino 7 feb. 1958. 17–35-jaraj gekursanoj atendas korespondontojn.

Antonio Martin, Lope de Vega No. 34b, Pueblo Nuevo, Barcelona. Hispanujo. 30-jaraĝa komencanto. Pm, aerajn, pogrando.

S-ro Lalanne, instruisto, Monassaut, (Basses-Pyrenees), Francujo. Per sonbendoj, kun aliaj lernejoj.

P. Anso, Tartu, kastani 24-I, Estonia SSR, USSR. Poŝtmarkoj.

ALILANDANOJ ATENTU : Dr. Wm. A. von Nimitz, M. D., State Hospital, P. O. Box 7206, Hackberry Station, San Antonio 10, Texas, USONO. Pri diversaj temoj; interŝ. il. pk., fotojn, pm. (kuracistoj). Del. de UEA en sia urbo. Klaran adreson.

# Trans la Lingvaj Barilojn

*Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportas al ni.*

BARCELONA, HISPANUJO, 28 Nov., 1956 — Ni ofte scivolis en kia maniero oni povus vivi kaj vojaĝi en Eŭropo sen Esperanto. Kvankam la loĝantoj de la diversaj landoj povas aĉeti manĝaĵojn kaj aliajn aĵojn kaj lui ĉambrojn per malgrandaj sumoj, turisto ne povas fari same. Mi kaj mia edzino ricevas malgrandajn monatajn enspezojn, kaj sen la helpo de la esperantistoj ni certe ne povus vivi kaj vojaĝi per niaj enspezoj. La turisto en Eŭropo devas pagi multe da mono por vivi, por aĉeti manĝojn en la restoracioj kaj por lui hotelĉambrojn, kaj por aliaj vojaĝaj aferoj. Por ni estas pli facile ĉar, ekzemple, kiam ni alvenas en urbo ni telefonas al la esperantistoj tie kaj ili povas sciigi nin pri malmulte kostaj lokoj por resti kaj manĝi. Kompreneble, la lingva barilo ne ekzistas por ni esperantistoj, sed la ordinaraj turistoj devas iri al la grandaj hoteloj kaj restoracioj, por trovi personojn kiuj povas paroli angle. Do, mi opinias ke mi kaj Bonnie havas grandan ŝuldon al nia lingvo, Esperanto, kaj en la estonteco, kiam kaj kie ni povos, ni laboros por la movado.

En Barcelono ni tuj ricevis helpon de la esperantistoj por trovi bonan ĉambron en pensiono en la malnova kvartalo de la urbo. La personoj ĉe nia hotelo ne povas paroli angle, sed esperantisto, S-ro Gisbert, helpis nin, per telefono, por lui la ĉambron kaj aranĝi la diversajn aferojn kun la hotelistoj. Ni alvenis mardon, la 20an de novembro, dum la vespero kaj, ĉar pluvis kaj ni estis sufiĉe lacaj post unu- kaj duontaga vojaĝo de Parizo, ni enlitigis frue kaj ne havis tempon por kontakti la geesperantistojn.

La venontan tagon, ankoraŭ pluvis do ni restis en nia ĉambro ĝis la sesa vespere, kiam la pluvo ĉesis. Ni marŝis al la oficejo de Prof. Dalmaŭ, ĉefdelegito de UEA en Hispanujo, por renkonti lin kaj sciigi pri la urbo Barcelono. S-ano Dalmaŭ estas afabla, amika viro, profesoro de lingvoj, kiu sciigis nin pri la Esperanto-movado en Barcelono kaj Hispanujo, kaj pri la urbo.

Tiun vesperon ni ĉeestis klason ĉe "La Casa Valencia", kie S-ro Sebastia Alberich gvidas kurson por komencantoj. Ni parolis pri Kalifornio kaj S-ro Alberich tradukis por montri ke la lingvo estas praktika kaj utila. Poste ni iris al kunveno de alia klaso. Post la klaso ni interparolis kun la malnovaj esperantistoj ĝis la dekdna.

Ni lernis multe pri la Esperanto-movado dum la unua tago de nia restado. Ekzemple, la registaro de Hispanujo malpermesas apartan esperantan grupon aŭ societon. Do, la geesperantistoj en Barcelono, kaj en aliaj urboj en Hispanujo, devis formi apartajn grupojn, kiuj estas aliĝintaj al permesataj sociaj kluboj. Kompreneble, ili ne havas la forton de unuiĝo kaj, kvankam ekzistas multaj geesperantistoj ĉi tie kaj ili laboras multe, ili ne povas fari tiel multe kiel la geesperantistoj en aliaj lokoj.

Dum la sekvantaj tagoj ni estis tre okupataj ĉar multaj geesperantistoj akompanis nin je diversaj tempoj por vidi la urbon kaj la vidaĵojn en la ĉirkaŭaĵoj. Ni renkontis pli da esperantistoj ĉi tie ol en aliaj urboj, ĉar ili ĉiam serĉas la okazon por paroli kun alilandanoj, kaj precipe kun usonanoj:

→	9	6	7	18	15	6
16	14	3	18	5	6	15
14	18	15	6	15	4	14
7	7	12	1	14	5	5
3	6	7	6	8	14	4
18	9	11	8	18	4	6
2	18	2	9	14	13	1
3	14	10	6	17	4	14

### E N I G M O

Ĉiu nombro signifas unu literon.

1. Floro . . . . . 1, 11, 6, 8, 6
2. Legomo . . . . . 16, 14, 5, 6
3. Malgranda mamulo 9, 6, 17, 18, 10, 6
4. Homa internaĵo 3, 11, 7, 6
5. Nomo de l'embrio 13, 14, 2, 6
6. Atento por eviti  
dangĉeron . . . 12, 18, 4, 15, 6

En ĉiun kvadraton enmetu tiun literon, kiun la numero signifas, kaj poste legu ilin laŭ la direkto de la sago. La tuta teksto donas penson de L. Zamenhof.

La solvon bonvolu sendi al la redaktoro de la Revuo.

La nomoj de solvintoj estos publikitaj.

La solvo aperos en venonta numero.

Neniu premio. Nur por amuzo.

Enigmo sendita de A. Holzhaus, Chicago.

*Solvis la oktobran enigmon, verkitan de S-ro A. D. Cook:* A. Holzhaus.

*Solvo:* Lia, arbo, lilio, ario, nano, didelfo, okulo, dalio, ebono, loĵala.

*La lando de la blinduloj.*

Ĉu vi povas solvi ĉi tiun?

DECIDO de la ESTRARO  
S-ro J. E. Bush, en Milwaukee, estas nova Estrarano de ELNA.

### ADRESOJ de POSTENULOJ de ELNA

Prezidanto: Armin F. Doneis, Sr.

Box 105, Pharr, Texas.

Vicprezidanto: Dirk Brink,  
525 Grove St., San Francisco 2, Calif.

Sekretario: Conrad Fisher,  
RFD 1, Meadville, Pennsylvania.

Kasisto: Edw. W. Pharo, Jr.,  
220 County Line Rd., Somerton 16, Pa.

### ESTRARANOJ

David B. Richardson.

3412 North Mullen, Tacoma 7, Wash.

Miss Roan U. Orloff,

31 Nahanton St., Newton Centre 59, Mass.

Elwyn C. Pollock,

2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.

Thomas A. Goldman,

719 Chapala Dr., Pacific Palisades, Calif.

Forrest J. Ackerman

915 S. Sherbourne Dr., Los Angeles, Calif.

Howard G. Borden,

917 Edgewood Ave., Trenton 8, N. J.

Adrian Hughes,

476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

Francis E. Helmuth,

803 Gage Dr., San Diego 6, Calif.

Jarvis E. Bush,

3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wis.



---

## MEMORNOTO

Samideano Stanley A. Klukowski, fidela pioniro nia, multjare kormalsana, mortis je la 21a de novembro en Milwaukee.

Stanley A. Klukowski estis multjara, energia, talenta kaj sindonema Esperantisto kiu dediĉis siajn eksterordinarajn kapablojn kaj entuziasmon al la disvastigo de Esperanto dum multaj jaroj en Milwaukee kaj ĉirkaŭaĵo, gvidante kursojn, farante paroladojn, radio-disaŭdigojn, prelegojn, kaj intervjuojn en la gazetaro. Li estis profesie ĵurnalisto kaj redaktoro de pluraj pollingvaj gazetoj kaj eldonejoj dum multaj jaroj, kaj mem entreprenis la fondadon de "Interlanguage Foundation", kies ĉefa frukto estis eldono de la bona lernolibro "Esperanto for Americans".

Li naskiĝis en 1895 en Varsovio, Polujo, komencis lerni Esperanton en 1908, elmigris al Usono en 1912, post edukigo en Polujo, Ruslando kaj Germanujo. Dum pluraj jaroj li ne multe okupis sin pri Esperanto, sed renkonto kun S-ano Bartosz, redaktoro de pola gazeto en Stevens Point, Wis., revivigis lian intereson kaj revekis lian entuziasmon por Esperanto. Sekve li fervore klopodis por Esperanto-disvastigo kaj eldonis "Esperanto for Americans" kaj redaktis la ĵurnalon "Usona Revuo". Dum pluraj jaroj li elspezis grandajn monsumojn el sia propra poŝo por propagandi Esperanton, kaj donis bonegan ekzemplon al aliaj gesamideanoj por malavare finance subteni nian movadon.

La familion ni kondolencas kore.

---

MANKAS en la dokumentaro de ELNA Informiloj 3, 4 kaj 5, el la organiza periodo de nia Ligo. Kiu volas doni, por kompletigi la arkivon?

Sendu al: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pennsylvania.



## LASTMOMENTAĴOJ

La Kanada Esperanto-Asocio refondiĝis. Kotizo, \$3 jare. Organo, *La Kanada Lumo*. Adreso: Box 52, Terminal A, Toronto, Ont., Kanado.

Distrikta kunveno de geinstruistoj en Yorkton, Saskatchewan, Kanado, adoptis rezolucion petantan ke oni enkonduku Esperanton en la studtemaron de gimnazioj kaj starigu someran klason por instrui la lingvon al geinstruistoj.

---

## Bonvolu Skribi

S-ino Melani Peroviĉ, Filipa Kljajiĉa 17, Belgrade, Jugoslavio. 20-jara studento de ekonomio. Pri lingvoj, vojaĝoj; inters. pk.

S-ro Bruno Siegert, Marienstr. 32, Fürth in Bayern, Germanujo. 64-jara invalido. Interŝ. pm.


F-ino Jirina Temlikova, Stalinova 15, Rymarov, Ĉeĥoslovakio. 32-jara oficistino. Pri Usono; interŝ. pm., pk., ktp.

S-ro Roberto Bocskay, Korompai u. 15, Budapest, Hungario. 19-jara fraŭlo, radioteknikisto. Pri Usono kaj Hungario. Interŝ. pm., pk.

ALILANDANOJ SKRIBU AL la gekursanoj de: Sergio Docal, 1742 Kilbourne Place, NW, Washington 10, D. C.

---

*El Imparcial*, ĵurnalo en Gvatemalo, 16 aŭgusto, 1957, prezentis rubrikon "Notas Esperantistas" kiu konsistis el informoj el *Nordamerika Esperanto-Revuo* kaj *Norda Prismo*, tradukitaj de Consuelo de Sánchez-Latour.



### Traveling?

See an Esperanto Teacher First!

#### DO YOU KNOW — — —

The National Institute of Geography and Statistics of Brazil is preparing a monograph on the city of Niteroi, seat of the 15th Brazilian Esperanto Congress. For your copy, write to: Liga Brasileira de Esperanto, Praça de Republica, 54, 1º, Rio de Janeiro, DF, Brazil.

The Institute of Linguistics and the Language and Literature Branch of the Rumanian Academy of Science, after a debate on the problem of international language, have recommended Esperanto as its definite solution.

### ANONCOJ

*Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojaj aperoj. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.*

*Introduction to*  
**ESPERANTO**  
 THE UNIVERSAL LANGUAGE  
 The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00  
 Sent on Five Days FREE Examination!  
 BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

\*\*\*\*\*

Learn

ESPERANTO

by Correspondence

ESPERANTO-by-MAIL

123 East 35 Street Brooklyn 3, N. Y.

☆☆☆☆☆\*\*\*\*\*☆☆☆☆☆

### “ENGLISH IS UNIVERSAL”

Mr. Kiyoshi Ikegawa, Deputy Director of the Public Welfare Bureau in Osaka, Japan, uses business cards printed in Esperanto for his contacts with persons who cannot read Japanese. After all, he cannot have cards in the national languages of all his visitors, so why play favorites?

During a recent brief stopover at Seattle, Mr. Ikegawa recounted an experience during a trip to England. He was attending a lecture given *in English* by a Japanese colleague, like Mr. Ikegawa a cultured gentleman and an “expert” on use of the English language.

An English lady, sitting next to Mr. Ikegawa, asked whether he was of the same nationality as the speaker. He replied that he was.

She then asked from what country they came. Mr. Ikegawa told her that they were from Japan.

The lady listened quietly to the lecture for a few moments, then said in a tone of surprise, “The Japanese language sounds quite similar to English, doesn't it?”

### An Urgent Appeal!

The local committee for the erection of the Zamenhof monument in Vienna in 1958 has asked me to appeal for financial help here in North America.

The cost will be about 40,000 Austrian schillings (1 sch. = 35¢).

Contributions in cash, check or money order may be sent to me, or to the American representative of the International Esperanto Museum in Vienna: Wm. E. Baff, 610 C St. S. E., Washington 3, D. C. *Conrad Fisher, Secretary,* Esperanto League for North America, Meadville, Pennsylvania.



## Local Addresses

Centro por Kanadaj Esperantistoj: Box 52, Terminal A, Toronto, Kanado.

Esperanto-Klubo de Los Angeles: 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, Calif.

Washington Esperanto Club: Apt. 101, 2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.

Esperanto-Societo de San Diego: P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Seattle Esperanto Society: 3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

Esperanto in Buffalo: P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas: P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica: 855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Esperanto Society of Greater New York: 767 United Nations Plaza, New York 1, N.Y.

Esperanto Society of San Francisco: 346 Staples Ave., San Francisco 12, Calif.

Sacramento Esperanto Club, 450 45th St., Sacramento 19, California.

Esperanto Society of Long Beach: R. C. Betteridge, Pres., 5409 Graywood Ave.,  
Lakewood, Cal.

Skolta Esperantista Ligo, Massachusetts Grupo, Thomas Duncan, Grupestro,  
73 Winchester St., Brookline 46, Mass.

Kontraŭbabela Ligo de Tampa, 403 East North St., Tampa 4, Florida.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue, Spokane 32, Wash.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wisconsin.

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Kanado.

F-ino Ethel Kelley, Birch-haven, RFD 1, Cambridge Springs, Penna.

Mr. and Mrs. Wesley Stevens, 211 North Dithridge Ave., Pittsburgh 13, Penna.


(a blind couple, correspond by tape recordings. Want local contacts for study group.)

---

### PUZZLED ?

Write to one of the above addresses  
and find out how easy it is to understand

### ESPERANTO



---

## Kuracistoj, Helpu!

La jena urĝa peto venis al ni el Bulgario:

Estimataj Gesamideanoj:

27-jara edzino de juna bulgara kuracisto estas malsana de "sclerosis disseminata". Post longa kuracado ŝi ne havas sukceson kaj nun petas helpon de la kuracistoj kaj apotekistoj de la tuta mondo. Bonvolu skribi letere kaj eventuale sendi kuracaĵojn al: D-ro Ivan Kirčev, fakdelegito de UEA por medicino, Kubrat, Bulgario.



## OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU !)

Nokto Sur la Ĉiam Maldensejo  
(*Everglades de Florida*)

Blindiga de fulmo ekbrilo  
La meznoktan nubon fendas;  
Ruliĝo krakega de tondro  
Koron en gorgo pendas;  
Odoro de stranga marĉaĵo  
Sin nebulete etendas,  
Ĝis krieganta vento kaj pluvo  
Martelanta ĝin forsendas.  
Ĉiu eta kreitaĵo kaŭras  
Sub folio, silente plendas.  
Subite la furiozo foriras,  
Distance mortanta sono.  
Susurado kuras laŭ la tero,  
Flustro, ke nun venas bono.  
Eta bleko aŭdiĝas, mallaŭta bojeto,  
Krietoj ampleksas je tono.  
Nuboj forirantaj malkaŝas  
Paciencon stelaron en fono,  
Ŝelon mallarĝan de luno  
Serena sur ĉiela la trono.

*de Sardelo*

Responde al demandoj: R. Y., Sendube vi pravas. Tiu Sardelo estas freneza, kaj pro tio bone taŭgas kiel kunlaboranto kun la Ĉefrimisto. Jen lastatempa frenezaĵo de tiu lasta: Li eĉ ne povas tutserioze pritrakti siajn devojn kiel busŝoforo, sed disdonas al la pasaĝeroj "vizitkartojn" kun la suba teksto (aliflanke, informo pri Esperanto).

At Greenwood your W. 85 St. driver suggests that you  
"Transfer here to the Woodland Zoo,  
The camel and cougar and kangaroo,  
And badger and bison and Bobo, too.  
If any of you are downhearted and blue  
You should go watch the monkeys an hour or two."

GO CAREFREE                      Go Transit with *Ferd. Carlson*

Kaj tiu freneza ŝoforo efektive kantas la rimon kiam la buso atingas transirejon de buso al la zoologia ĝardeno! Freneze? Sendube! Dum tri semajnoj li disdonis 1000 kartojn. Kaj (Jen io tre malofta eĉ niaj informiloj) kredeble, laŭ komentoj aŭdataj, ĉiu ricevinto atente legas (ambaŭflanke) kaj zorge konservas la karton por montri al siaj geamikoj. Venu, ĉiuj frenezuloj! Ni esperantigu ĉi tiun frenezan mondon!

Simia Afero (*de Sardelo*)  
Simio sidis arbobranĉe.  
Babilaĉemulo!  
Parolis ĉiam laŭnature.  
Babilaĉemulo!  
Ne volis vortigi distranĉe.  
Babilaĉemulo!  
Alie ne estus mature.  
Babilaĉemulo!  
Ĉar de la tempo antikvega ---  
Babilaĉemulo!  
Simio, kiu sin respektas,  
Babilaĉemulo!  
Kredas lingvon kontraŭleĝa,  
Babilaĉemulo!  
Tial bruojn interplektas.  
Babilaĉemulo!  
Simia naturo, komprene,  
Babilaĉemulo!  
Malestimas lerni tro multe.  
Babilaĉemulo!  
Konfuzon li ĝuadas retene,  
Babilaĉemulo!  
Kvankam tiel agas li stulte.  
Babilaĉemulo!

## Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

### THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

### THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

*-us*; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

